

## PENSU PRI MI

Esperantigo: Rovere Emanuele

Muziko / vortoj : Greber Maria

Se neniu volas kredi, ke mi amas vin, estas nur ĉar mi neniam enamiĝis.

Mi mem surpriziĝas, kiam mi konstatas, ke vere tre profunde mi ŝanĝiĝis.

Celo mia estas nur apud vi resti kaj mi devas miajn emojn moderigi,

dum momentoj, kiam mia granda sento min igas ĵaluza pri l'viroj ĉirkaŭ vi.

Pensu pri mi, senhezite kaj intense, jen perkorpe, jen permense,

kvazaŭ estus mi kun vi; rigardu min, per okuloj via belaj

foje trompaj, amoŝtelaj, same mi ŝategas vin.

Amu min, forte kiel amantino,

kiu, ĝis la vivofino, tute oferdonas sin.

Kisu min ! Kisu mian tutan haŭton !

Ĉar eblas tuŝi l' ĉielon, dirinte nur simple: JES !